

La kaŝitaj vizaĝoj de Fidel Castro

Epizodoj el lia persona kaj politika vivo

Kubo okaze de la morto de Fidel Castro Ruz, la 25an de novembro 2016



Fulgencio Batista, Fidel Castro Ruz, Ernest „Che“ Guevara, Hotelo Habana Libre, Raúl Castro, memorialo José Martí

Jean Ziegler, la fama svisa supermaldekstrulo, kiu kelkfoje faras aŭ pravajn aŭ dubindajn konkludojn pri la historio de la socialismo kaj kapitalismo, asertis okaze de la morto de Fidel Castro la 25an de novembro 2016, ke „li donis al milionoj da homoj pli dignan vivon“. Mankas malmulte kaj Ziegler, al kiu liaj kritikantoj riproĉas enormajn naivecon kaj malhonestecon, verŝajne pretus levi la mortinton al la rango de sanktulo, nature komunisma.

Fidel Castro estis aŭ admirata aŭ abomenata de la homaro. Sed malantaŭ lia fasado troviĝis nekonata persono, kiun eĉ liaj biografiistoj ne sukcesis malkaŝi. Kiu do fakte estis Fidel Castro?

Lukto kontraŭ maljusteco

Kelkaj faktoj el lia persona kaj politika biografio heligu la fenomenon: Fidel Castro Ruz naskiĝis en 1926 aŭ 1927 kiel filo de plantisto de sukerkano, Angel Castro Árgiz, kiu originis el Galicio (Hispanio), kaj ties dungita kuiristino Lina Ruz González, kiu ne estis lia edzino. Lia mondo estis la grandaj bienfarmistoj, inter kiuj li kreskis kun sia frato Raúl (nask. en 1931). Fidel estis edukita kiel katoliko. Li vizitis jezuitan kolezion kaj frekventis la universitaton de Havano. Kiel Fidel mem rakontis, en la junaĝo kaj lerneja tempo li eksentis drastan maljustecon, kiu tiam furoris en la lando de Fulgencio Batista. La kuba ĉefurbo tiam estis ŝatata loko de amuziĝemaj usonaj turistoj kaj regata de koruptaj registaroj kaj de la mafio, dum granda parto de la popolo vivis en mizero kaj malriĉeco. Castro, studento pri juro, kritikis tiujn kondiĉojn, precipe la korupton, kaj alvokis la kubanojn, ke ili „fieru pri sia nacio“. Fidel, kiu nun elpaŝis kiel maldekstra naciisto, estis perceptata de la universitatoj kiel alloga, bonaspekta maĉisma intelektulo kun brilaj talentoj de oratoro kaj aktoro, kiu imponis precipe virinojn. Li komprenis, kion la homoj volas aŭdi – do kun Fidel Castro naskiĝis vera ‘popolisto’ kun karismo. Legendecaj estis liaj romanoj kun diversaj virinoj. En 1948 Castro edziĝis kun Mirta Díaz-Balart (nask. en 1928), kiu estis studentino pri filozofio kaj same kiel li originis el pli alta tavolo. La mielan tempon la paro pasigis en Florido, Usono, de kie oni pluvojaĝis al Novjorko, kie Fidel aĉetis la „Kapitalon“ de Karlo Markso. Sed lin pli fascinis alia figuro – la iama usona prezidento Franklin D. Roosevelt (kiu forpasis en 1945). Kiel junulo Castro gratulis al li okaze de lia reelekto. Kiel lerta basballudisto Castro bone parolis la anglan lingvon. Sed anstataŭ elekti la profesion sporton, Castro preferis fariĝi advokato por malriĉuloj en Kubo. Li komencis revii pri politika renverso kaj serĉis aliancanojn. Li eĉ ekriatis kun Natalia Revuelta (1925-2015), filino de medicinisto, al kiu li petis apogon por sia revolucia movado. Lia celo estis forpuĉi la diktatoron Batista.

Kuba revolucio

En julio 1951 en Santiago de Cuba okazis karnavalo, kaj ĉar Castro kredis, ke la armeo ne estas tre atentema, li riskis kun kelkaj malbone armitaj samideanoj ataki la kazernon Moncada kaj provis lanĉi tutlandan ribelon. Sed la atako mizere fiaskis. La armeo disbatis la ribelon, mortigis la duonon de la atakintoj kaj arestis la reston. Fidel Castro, kiu supertaksis siajn fortojn, kun granda bonŝanco sukcesis eskapi el la pluvo de kugloj, kiuj preskaŭ trafis lin. Sed li povis esti kaptita. En la malliberejo Fidel Castro reorganizis sian trupon. Post sia liberiĝo en julio 1955 Castro forveturis al Meksiko, lia ekzilejo, kie komenciĝis lia milita trejnado kiel gerilano. En Meksiko Castro konatiĝis kun la argentina revoluciulo Ernest „Che“ Guevara (nask. en 1928), kun kiu kaj Camilo Cienfuegos, lia frato Raúl kaj 78 pliaj ribeluloj li veturis, la 25an de novembro 1956, sur la motorjaĥto „Granma“ al Kubo, kie ili alvenis la 2an de decembro. La aventureca veturo preskaŭ fiaskis. En la montaro de Sierra Maestra Castro gvidis la gerilanoj kiel ĉefkomandisto; 320 partizanoj devis batali kontraŭ dek mil armeaj soldatoj! Ideologie, la duopo Castro-Guevara reprezentis la „novan homon“ kaj volis lukti por la „justa afero“. Tio sonis je marksismo, socialismo, komunismo. La plej proksima kamarado de Castro fariĝis nova virino: Celia Sánchez (nask. en 1920), fidela ĝis la morto en 1980.

Post kiam la diktatoro (aŭ almenaŭ duondiktatoro) Fulgencio Batista (1901-73) povis esti forpelita komence de januaro 1959, Fidel Castro kaj liaj batalantoj marŝis al Havano, kie la 32-jara revoluciulo prezentis sin al la publiko, kiu vidis lin kiel talentitan originalan aktoron. La tuta spektaklo kun falantaj packolomboj aspektis tiel, kvazaŭ Fidel Castro venis sur la mondon kiel savanto. Castro translokiĝis al la hotelo Hilton en Havano (kiu post la ŝtatigo nomiĝis Habana Libre), kiu dume servis kiel lia ĉefkomandejo. Memorinda iĝis lia prezentiĝo en piĵamo kun sia samnoma filo, kiu same parolis angle, al la usona televido. La demandon de la perpleksa ĵurnalisto, ĉu oni devas timi kreskantan komunisman influon en Kubo, la sensacia hotelgasto respondis, ke en Kubo komunisma danĝero ne ekzistas. Li eĉ promesis reviziti Usonon tuj kiam la okazo aperos. Fakte, kelkajn monatojn poste Castro flugis al Novjorko laŭ invito de usonaj eldonistoj. Al la usonanoj li klarigis, ke li ne intencas enkonduki la komunismon en Kubon, sed ili tamen profunde malfidis lin. Fidel ankaŭ ne petis monon de la usonanoj, sed li atendis ilian komprenon por la kuba revolucio. Sed prezidento Eisenhower ne bonvolis renkonti la kuban revoluciestron. Castro estis akceptita nur de lia anstataŭanto Richard Nixon. La kubano estis profunde ofendita kaj ne sentis sin serioze traktita de la usonaj gvidantoj, kiuj eĉ planis lian mortigon. Castro intencis venĝi sin. Iam poste Castro revojaĝis al Usono, kie li vizitis Unuiĝintajn Naciojn kaj devis restadi en modesta hotelo en Harlemono. Intertempe, en Kubo ŝtatiĝis la posedo de grandaj bienfarmistoj kaj usonaj entreprenistoj. Dum la usonanoj demonstris sian malintereson pri li, Castro estis afable traktata de Nikita Ĥruŝĉov, gvidanto de Sovetunio, kun fatalaj sekvoj.

Castro – bona kaj malbona homo

Laŭ Miguel Barnet, kuba verkisto, Fidel Castro instruis al la kubanoj senti dignon, defendi principojn, kaj helpis konstrui nacion, kiu ne estas perfekta, sed kiu havas altan moralan pozicion en la mondo, kiu ĝenerale agnoskis la aserton, ke sub Fidel Castro Kubo faris kelkajn gravajn atingojn: pli da socia justeco, bonaj lernejoj kaj kvalita sansistemo, socio sen rasismo – kompare kun aliaj latinamerikaj landoj. Povas esti, sed ankaŭ tio apartenas al la kuba mitologio. Oni povas imagi, kion la kubaj lernantoj lernis kaj kion oni ne diris al ili. Ĉu malfacila komplika operacio de la homa korpo, kiu en Usono aŭ Eŭropo kostas kelkdek mil frankojn, estas farebla en Kubo? Ĉu specialaj medikamentoj kontraŭ kancero ekzistas? Ĉu modernaj aparatoj, kiuj kostas milionojn kaj kiuj povas savi la vivon de homoj, ekzistas en Kubo? Ekzistas duboj. Sed la kuba revolucio havas ankaŭ alian flankon de la medalo: Multaj homoj, kiuj ne konsentis kun la opinioj de Fidel Castro, spertis ankaŭ lian eksterordinaran senkompaton. Ekzemple Huber Matos (1918-2014), iama kunbatalanto de Castro, opiniis, ke la kuba revolucio transformiĝis pli kaj pli al komunisma diktaturo. Kiam en 1959 komandisto Matos rezignis kunlabori kun Castro, li estis tiel ĉagrenita, ke li arestigis lin kaj neniam pardonpetis al li tiun pekon. Sed Castro rompis ankaŭ kun aliaj iamaj kamaradoj: Camilo Cienfuegos (nask. en 1932), kiu devis malliberigi Huber Matos, malaperis senspuro super la Oceano, verŝajne lia aviadilo estis forpafita de la kuba armeo. Lige kun la malaperigo de Cienfuegos poste mortis ankaŭ aliaj iamaj kunbatalantoj de la Castro-fratoj. En la malliberejo, kie li sidis dudek jarojn, Huber Matos estis kruele turmentata, dum Castro loĝis en

burĝaj vivkondiĉoj, ŝatis legi librojn, praktiki sporton. En lia domo staris ne nur pafilo, sed ankaŭ pendis kristana kruco.

Kun Moskvo kontraŭ Usono dum la „Malvarma Milito“

En aprilo 1961, ekzilkubanoj, subtenataj de la usona sekreta servo, intencis puĉi kontraŭ Castro kaj invadis Kubon tra la t.n. „Golfo de Porkoj“. La invado mizere fiaskis, ĉar Castro sukcesis haltigi ĝin kaj aresti pli ol mil atakintojn. La incidenton li eluzis por deklari sin marksisto-leninisto kaj proklami Kubon socialisma. El naciisto fariĝis komunisto. Lian paranojon sub la moto „patrujo aŭ morto“ kaj simile kompletigis skizofrenio, kiam la aŭtoro de la kuba revolucio anoncis, fakte promesis al la kubanoj, ke post kelkaj jaroj ilia vivnivelo superos tiun de Usono. Sed la realeco aspektis alie: la provizado de la popolo per nutraĵoj en Kubo devis esti limigata, ĉar ili komencis manki, kaj la peso, la kuba mono, restis nekonvertebla. La usonanoj, kiuj ne rezignis pri siaj mortigaj intencoj, lanĉis en Kubo diversajn atencojn kontraŭ Castro kaj sabotadis la sistemon kaj infrastrukturon. Sed la plano likvidi la ŝtatestron ĉiam malsukcesis, ĉar Castro, kiu vidis alveni kaj foriri almenaŭ dek usonajn prezidentojn, lernis vivi kun tiu danĝero, ofte ŝanĝiĝante la loĝlokon. Nemortigebla Castro ne portis protektveston kontraŭ kugloj, sed „moralan veston“, kiel li ŝerce diris, montrante sian liberan bruston. Philipp Agee, iama ano de CIA, konfirmis, ke en la 60aj jaroj la usona registaro havis la oficialan celon mortigi Castron. Sed Moskvo helpis al la kuba gvidanto pluekzisti. En somero 1962 la sovetianoj sekrete transportis nukleajn armilojn al Kubo, kiujn usonaj spionaj aviadiloj tamen malkovris. Ŝajnas, ke la mondo troviĝis sojle de nuklea milito. La nukleaj armiloj ne signifis danĝeron unuavce pro tio, ke la sovetianoj transportis ilin al Kubo, sed ĉar Fidel Castro, kiu konsideris ilin kiel asekuron, postulis ilian utiligon. Prezidento Kennedy minacis, ke Usono resendos ĉiujn ŝipojn, kiuj estas survoje al Kubo kun atakaj armiloj. Usonaj militŝipoj ĉirkaŭis la insulon. Castro komencis prepari la kubanojn al usona invado; tra la sovetia ambasadoro en Havano li eĉ sugestis en telegramo al Ĥruŝĉov la ideon elimini la usonan danĝeron per nuklea atako kontraŭ Usono en la senco de memdefendo: „Ni devus esti la unuaj kaj ekstermi ilin, kaze ke ili atakas Kubon“, li skribis sur la kulmino de sia malamo kontraŭ Usono, ĉar alian solvon li ne vidis. Prefere la kuba popolo dronu, sed kun „granda digno“. Kompreninte la riskon, la sovetia potenculo, kiu nepre volis eviti novan (mond)militon, respondis al Castro: „Havu paciencon, moderigu vin.“ Ĥruŝĉov, kiu trovis la „proponon“ de Castro pri nuklea atako „malĝusta“, promesis trovi solvon kun Kennedy kaj ke li samtempe protektos Kubon. Post tia sekreta kompromisa interkonsento kun Usono, kiu promesis, ke ĝi rezignos invadi Kubon, la sovetianoj retiris siajn nukleajn armilojn de la insulo. Castro estis kolera kaj devis esti trankviligita de la sovetianoj, la rilatoj inter Kubo kaj Sovetunio ŝajnis esti frakasitaj. Por eviti tian scenaron, Castro estis invitita viziti Sovetunion, kie li devis kompreni, kiel la interkonsento kun Kennedy efektiviĝis. Nature, Castro malfidos la rusojn, kaj tiuj malfidos lin. Flanke de Usono Castro devis timi esti forpuŝita, sed Kennedy praktikis ruzan diplomation; usonaj diplomatoj veturis al Havano, kie ili estis sekrete akceptitaj de Castro por malstreĉi la kverelon kaj normaligi la rilatojn. Anstataŭ Castro, la 22an de novembro 1963 Kennedy estis mortigita. Iuj eble kredis, ke Castro aranĝis la atencon de Dallas. Post tiu tragika incidento, la usonaj prezidentoj draste malvarmigis la rilatojn kun Kubo kaj Castro, precipe Nixon. Kennedy riproĉis al Nixon, ke li toleris la teroron de la Batista-reĝimo, kaj Nixon kredis, ke li ne fariĝis prezidento pro Castro, kiu sukcesis faligi la kuban potenculon. Do, Nixon estis konvinkita, ke Castro kulpas pri ĉiuj liaj politikaj malsukcesoj kaj problemoj. Poste Castro perdis la intereson pri nukleaj armiloj, post kiam li verŝajne komprenis, kian katastrofon ili povus kaŭzi, kaj avertis la homaron kontraŭ la danĝero de „nuklea holokaŭsto“.

Dume, ankaŭ la rilatoj inter Fidel Castro kaj Che Guevara, kiu estis ministro pri industrio de Kubo, malboniĝis, kiam la ekonomio montris krizajn simptomojn. Kiam Guevara riproĉis al Sovetunio imperiismon, furioza Castro liberigis lin de tiu registara respondeco. En 1965 Guevara malaperis de Kubo al Bolivio, kie li lanĉis gerilan militon, en kiu li perdis la vivon en oktobro 1967. Malgraŭ tiu situacio, Guevara neniam ĉesis esti heroo ankaŭ por Castro kaj la kuba popolo.

Alia malhela ĉapitro koncernas la 'laboron' de kubaj „internaciistoj“ en formo de agentoj, spionoj, sekretservistoj, partiaj gvidantoj kaj armeaj funkciuloj, kiuj konspire agadis en dudeko da landoj de la mondo. En la afrikaj militoj de la sepdekaj kaj okdekaj jaroj, de Angolo ĝis Etiopio kaj Alĝerio, batalis ĉirkaŭ 400 mil kubaj soldatoj, de kiuj pereis minimume dek mil. Ankaŭ Nelson Mandela aprezis la kuban apogon al la naciliberiga batalo de Sudafriko. Por lando kun malpli ol dek milionoj da

enloĝantoj tio jam estis preskaŭ la dimensio de malgranda koloniisma mondmilito. Ankaŭ tiu dubinda epizodo ne devus manki sur la nigra listo de temoj kritike prilaborendaj fare de kubaj kaj alilandaj historiistoj, juristoj kaj politologoj, kies tasko devus esti esplori la krimojn plenumitajn dum la Castro-tempo.

Ne malbonaj tempoj sub la suno de la karibia socialismo

Restis al Castro teni bonajn rilatojn kun la komunistoj de la „Orienta Bloko“, precipe kun Leonid Breĵnev, estro de la sovetia komunisma partio, kaj Erich Honecker, gvidanto de GDR, kiuj ne nur faris laŭtan politikan propagando por Kubo, sed ankaŭ disponigis ekonomian kaj armean helpon. Pro tio en la 70aj kaj 80aj jaroj la kubanoj fartis sufiĉe bone en sia karibia paradizo, aŭ malliberejo, kie la suno eterne brilas, malgraŭ sistema manko de urĝe bezonataj varoj, bazaj civitanaj liberecoj kaj homaj rajtoj. La eksportado de sukero kaj tabako prosperegis kaj Kubo profitis malmultekostajn nafton kaj energion el Sovetunio. Usonaj turistoj kaj ekzilkubanoj alportis aŭ sendis sufiĉe multe da mono al la insulo, kiun la kubanoj mem ne rajtis forlasi. Centmiloj da civitanoj fuĝis al Usono, kie ĝis la jaro 2000 formiĝis granda kuba ekzilkomunumo de oficiale 828'577 personoj, dum Kubo samtempe produktis pli kaj pli da politikaj malliberuloj kaj persekutataj opoziciuloj, tiel ke la mondaj instancoj devis regule protesti kaj postuli ilian liberigon. En la fino la kuba registaro eĉ aplikis fian trukon kaj deklaris la politikajn viktimojn „ordinaraj krimuloj“ por eviti la regulan kritikon de la internacia komunumo, kiu fariĝis jam ĝena afero. Tiel, la insulon forlasis entute du milionoj da kubanoj. La internon de Kubo regis kliko de malnovaj revoluciaj amikoj kaj kamaradoj de Castro, kies publikaj paroladoj efikis kiel sanktaj mesoj kaj alprenis religian karakteron. Kiam Castro fariĝis pli maljuna, la gvidanto de la revolucio pli kaj pli ŝtonigis kiel groteska monumento. Kubo ne vivis de bonaj nutraĵojmkaj luksaj varoj, sed de ridindaj revoluciaj ritualoj, kiuj eĉ plaĉis al multaj homoj, ĉar ili konis nenion alian.

La kolapso de la monda komunismo ŝanĝas ĉion

Kiam Miĥail Gorbaĉov aperis sur la sceno de la historio, la nova sovetia ŝtatestro, kiu proklamis glasnoston kaj perestrojkon, kapablis ĝuste pritaksi la rolon de Castro kaj lia Kubo. Laŭ Gorbaĉov, Castro fariĝis komunisto, ĉar li troviĝis kvazaŭ en milita stato kun Usono kaj serĉis aliancanon, kiun li trovis en Sovetunio, kiu dependigis Kubon de si. Usono ne rezignis pri sia ekonomia blokado kontraŭ Kubo. Eĉ Unuiĝintaj Nacioj regule postulis fini la embargon kontraŭ Havano, ĉar ĝi jam perdis sian sencon. Tiun neŝanĝeblan staton Castro ruze eluzis por stabiligi sian senalternativan potencon en Kubo. Castro ludis Davidon, kaj Usono estis Goliato, kiu permesis al Kubo ludi Davidon.

Kiam Castro maljuniĝis, lia temperamento ŝajnis fariĝi iom pli milda. Papoj Johano Paŭlo IIa la polo, Benedikto XVIa la germano kaj Francisco la la argentinano vizitis unu post la alia la iaman katolikon en la karibia ŝtato de la ateistoj. Ĉu ili celis „rehejmigi la perditan filon“ aŭ kontribui al la faligo de la komunismo aŭ ĉu Fidel, kiu estis komparata kiel hibrido de Ignaco Lojola kaj Karlo Markso, serĉis sian pacon kun dio? Por la franca ĵurnalisto Jean Daniel, kiu mem rekontis la kuban komandanton, Fidel Castro estis la sama senskrupula diktatoro kiel ĉiuj aliaj diktatoroj de la mondo, kvankam li vivis modeste.

Bizara fino de la Castro-erao

Kiam en 2004 Castro falis kaj rompis al si iujn ostojn kaj kiam du jarojn poste li malsaniĝis je la intesto kaj devis esti operaciita, lia sano estis ruinigita, kaj lia erao venis al la fino. Li klopodis gvidi la ŝtaton de la lito, sed tio ne povis daŭri longe. Lia pli juna frato Raúl pli kaj pli transprenis la povon kaj la ŝtatajn funkciojn kaj respondecojn. Raúl, kiu deklaris sian mondfaman fraton „neanstataŭigebla“ kaj mem preferis ne konkurenci lin, enkondukis reformojn kaj komencis prepari la kubanojn al la erao post Fidel, pri kiu neniuj scias, kiel ĝi aspektos. La reformoj, al kiuj mankas radikaleco, permesas al kubanoj private labori en la ekonomiaj branĉoj de la gastronomio, turismo kaj metio. Malgraŭ tiaj reformoj, la bilanco estas ĉiam modesta aŭ eĉ negativa. Kubo ne vere moviĝis.

Kiam en 2016 prezidento Barak Obama vizitis Kubon por interpaciĝi kun la kubanoj kaj „forigi la restaĵojn de la „Malvarma Milito“, Fidel ne bonvolis renkonti lin, kvankam li iusence estimis lin kiel spiritan fraton kaj ne konsideris lin malamiko, dum ĉe multaj kubanoj eksplodis ĝojo, entuziasmo kaj espero. Kiel portanto de la nobelpremio pri paco kaj kiel malblankulo Obama ŝuldis tiun geston al Kubo. Ankaŭ Eŭropa Unio normaligis la rilatojn kun Havano. Sed la nova usona prezidento Donald Trump, kiu ŝajnas esti radikala malamiko de maldekstruloj, komunistoj, meksikanoj, kubanoj, nigruloj, anoncis, ke li intencas fini la degelan veteron kun Kubo kaj nuligi la interkonsentojn, kiujn la Obama-registaro faris kun Havano. Malgajaj perspektivoj por Kubo kaj la monda paco!

La 25an de novembro 2016, Raúl Castro anoncis la forpason de la kuba patriarko, ĝuste en la sama tago 60 jarojn post la veturo de Fidel Castro de Meksiko al Kubo sur la legenda ŝipo „Granma“. La urno kun la cindro, kiu estis veturigita tra tuta Kubo, estis entombigita la 4an de decembro en maŭzoleo de la tombejo Sankta Ifigenio en Santiago de Cuba, kie aliaj herooj de Kubo kiel José Martí trovis sian eternan pacon. La entombigo estis privata kaj la kuba televido ne dissendis ĝin. Frato Raúl ŝovis la urnon en la muron de la monumento. Per tio la 9-taga funebro finiĝis. Raúl anoncis, ke laŭ la deziro de la mortinto en Kubo ne okazos personkulto en formo de novaj stratoj, institucioj, statuoj aŭ monumentoj. Dum la funebra ceremonio la ĉeestantaj kubanoj vokis „Mi estas Fidel“. Inter la gastoj kolektiĝis kelkaj sudamerikaj kompanoj kiel Evo Morales, Daniel Ortega kaj Nicolás Maduro, prezidentoj de Bolivio, Nikaragvo kaj Venezuelo, same Dilma Rousseff kaj Lula da Silva, eksprezidentoj de Brazilo. Ĉeestis ankaŭ Diego Maradona, futblisto el Argentino, kaj ekskanceliero Gerhard Schröder el Germano.

Sendube, Fidel Castro estis unu el la plej kuriozaj figuroj de la historio de la 20a jarcento. Ĉefe por la maldekstra movado kaj la Tria Mondo li ludis la rolon de savanto kaj portanto de la espero por pli bona vivo. Kio antaŭ ĉio restos de Fidel Castro, estos, krom ruinoj, lia mito. Ne pro marksisma-leninisma dogmeco, sed Kubo fartis malbone pro la enormaj idea fanatiko kaj obstina rigideco de Fidel Castro mem kaj la sklavece lakea obeemo de lia hipokrita kaj cinika partia bando, kiu subpremas ĉian publikan kritikon pri la sistemo. Laŭ ĉiuj statistikoj kaj listoj pri homaj rajtoj kaj civitanaj liberecoj Kubo daŭre troviĝas preskaŭ ĉe la fino de la listo, ankaŭ sub Raúl, dum la bilanco pri la korupto kaj evoluo aspektas iom pli bone.

Do, la „novan Kubon“ atendas multaj taskoj por solvi, ne nur tiujn de la ekonomio, sed ankaŭ de la historio mem. La viktimoj de la politika subpremado atendas justecon, la junaj generacioj volas vivi pli bone, la premo flanke de la ekzilkubanoj estas grandega. La kubaj ŝtato kaj socio bezonus profundan renoviĝon sur ĉiuj sferoj de la vivo, se la lando volus progresi. Ke tio povos okazi sub komunisma regado, ekzistas duboj. Raúl anoncis, ke oni „ne perfidos la revolucion“, tio signifas per aliaj vortoj, ke la komunistoj kaj la Castro-klano ne rezignos pri sia potenco kaj ke la socialismo restos. Konklude: Tiel longe ke la malnova sistemo konserviĝas, la ŝancoj por rekomenco estas malgranda.

Fidel Castro verkis ampleksan aŭtobiografon, kiu aperis en diversaj lingvoj, kiu eble estas leginda. La plej kompetentan biografion eble verkis Volker Skierka. En Esperanto ekzistas nur du broŝuroj: ‘La historio absolvos min’ (Havano 1984) kaj ‘La dialogo de la civilizacioj’ (Francio 2009) kun paroladoj de Fidel Castro faritaj en 1992 kaj 2005.

La Esperanto-movado adoregis Fidel Castro-n, kiu nomis sin „soldato de Esperanto“, vizitis la 75an Universalan Kongreson en 1990 en Havano kaj renkontiĝis kun esperantistoj. Li eĉ akceptis grandan delegacion en la Palaco de la Revolucio, al kiu ankaŭ mi apartenis, ĉar mi estis vicprezidento de TEJO kaj ĉefredaktoro de *Tejo tutmonde!* Tie la esperantistoj povis konvinkiĝi pri la eksterordinaraj ĉarmo kaj elokventeco de tiu politika ‘dinosauro’. Kvankam en la statutoj de la Esperanto-organizaĵoj la principoj de la homaj rajtoj estas ankritaj, la Esperanto-movado ĉiam hezitis kritiki la lezojn de la homaj rajtoj en certaj landoj, ankaŭ en Kubo, regata de revolucioj, kiuj konsideras sin komunistoj, persekutante kaj subpremante samlandanojn dum jardekoj, nur ĉar ili esprimis alian opinion ol la anoj de la reĝimo de Castro. Tia dubinda sinteno rilate al la homa justeco kaj homa digno certe ne estas honoro por la socialismo, kiun Raúl Castro evidente intencas plukonstrui en Kubo – hasta la muerte.

* * *

© Originale verkita de Andreas Künzli laŭ jenaj utiligitaj fontoj:

<https://www.youtube.com/watch?v=QJxW6dDUTCA>

<https://www.welt.de/kultur/article159813683/Castro-draengte-Chruschtschow-zum-Atomkrieg.html>

<http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/amerika/Der-Revolutionaer-der-die-Atombombe-liebte/story/29851786>

<http://www.nzz.ch/feuilleton/fidel-castro-ist-gestorben-der-lange-tod-des-patriarchen-ld.130868>

<http://www.srf.ch/sendungen/zeitblende/fidel-castro-mit-der-motoryacht-in-die-revolution>

<http://www.luzernerzeitung.ch/nachrichten/schweiz/Zieglers-Treffen-mit-Fidel;art46447.900196>

<http://www.20min.ch/ausland/news/story/21787030>

<http://www.blick.ch/people-tv/kuba-ra-l-castro-schwoert-kubaner-auf-verteidigung-der-revolution-ein-id5849145.html>

<http://www.zeit.de/news/2016-12/04/regierung-fidel-castros-urne-wird-beigesetzt-04060010>

<http://www.faz.net/aktuell/politik/kuba-fidel-castro-beigesetzt-14558435.html>

<https://www.welt.de/politik/ausland/article159960208/Wird-Castros-letzter-Wunsch-erfuellt.html>

<http://www.bild.de/politik/ausland/kuba/staatsbegrabnis-in-santiago-de-cuba-49066324.bild.html>

<https://news.mail.ru/society/28012341/?ib=1>

<http://www.telesurtv.net/news/teleSUR-desde-Santiago-de-Cuba-20161204-0010.html>

<http://www.granma.cu/hasta-la-victoria-siempre-fidel/2016-12-04/fidel-junto-a-marti-04-12-2016-12-12-37>

<http://www.spiegel.de/politik/ausland/fidel-castro-auf-kuba-beerdigt-weinen-knutschen-cola-trinken-a-1124357.html>

<https://www.perlentaucher.de/buch/volker-skierka/fidel-castro.html>

<http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/amerika/ral-castros-letzte-chance/story/30577519>

<http://www.faz.net/aktuell/gesellschaft/menschen/mirta-diaz-balart-castros-ehemalige-frau-bricht-ihr-schweigen-14558320.html>

<https://www.youtube.com/watch?v=dr12jh8UGk0>

<http://latina-press.com/news/230925-eu-kuba-rat-schlaegt-neues-kapitel-in-den-beziehungen-auf/>

<http://www.mas-eo.org/spip.php?page=temoj>

kaj publikigita sur www.planlingvoj.ch en decembro 2016.

La aŭtoro (lic. phil. / M.A.), nask. en 1962 en Lucerno (Svislando), studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91. Kubon li vizitis en 1990, kie li restadis tri semajnojn lige kun du internaciaj Esperanto-kongresoj kaj iom veturis tra la lando.

Vidu ankaŭ:

http://www.planlingvoj.ch/Kubo_2016.pdf

http://www.planlingvoj.ch/KUBO_Politika_raporto_2010.pdf

<http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/standard/obamas-letzter-kubacoup/story/26723124>

Entscheid Obamas Kein Asyl mehr für Bootsflüchtlinge aus Kuba

von Nicole Anliker 13.1.2017, 09:15 Uhr

Ab sofort werden Kubaner, die illegal in die USA einreisen, zurückgeschickt. Das betrifft auch Bootsflüchtlinge, die bisher Asyl beantragen konnten.

-
-
-
-
-
-

KOMMENTARE

Acht Tage vor seinem Auszug aus dem Weissen Haus hat der scheidende amerikanische Präsident Barack Obama die Sonderregelung für die Einwanderung von Kubanern beendet. «Kubaner, die illegal in die Vereinigten Staaten einreisen und keinen Anspruch auf humanitären Schutz haben, werden ab sofort zurückgeschickt», sagte Obama am Donnerstag.

«Damit behandeln wir Migranten aus Kuba genauso wie Migranten aus anderen Ländern», sagte der Staatschef. Es sei ein Schritt, um die Beziehungen zu Kuba zu normalisieren. Obama hatte die Aussöhnung mit dem einstigen Erzfeind eingeleitet und wieder diplomatische Beziehungen zu der sozialistischen Karibikinsel aufgenommen.

Fischer bei Havanna. Das Boot «Flipper» könnte es nach Florida schaffen.(Bild: AP)

Bisher galt die Regel «Wet foot, dry foot». Kubaner, die es bis auf das amerikanische Festland schafften, konnten dort Asyl beantragen. Wurden die ohne Papiere einreisenden Migranten hingegen noch auf dem Meer aufgegriffen, schickten die amerikanischen Behörden sie nach Kuba zurück.

Havanna begrüsst Politikwechsel

Der kubanischen Regierung war die Regelung aus dem Jahr 1995 stets ein Dorn im Auge. Sie werteten sie als unzulässigen Anreiz für Kubaner, ihre Heimat zu verlassen. Die Regierung in Havanna begrüsst nun den Politikwechsel in Washington.

«Die Regelung hat Migrationskrisen ausgelöst, zu Entführungen von Schiffen und Flugzeugen geführt und Verbrechen wie Menschenhandel begünstigt», sagte die kubanische Spitzendiplomatin Josefina Vidal am Donnerstag in Havanna.

Kubas zögerliche Öffnung unter Raúl Castro
Die ewigen Revolutionäre

KOMMENTAR von Nicole Anliker 22.11.2016, 05:30

Wichtiger Schritt

Die Abschaffung der Sonderregel für Kubaner sei ein wichtiger Schritt zur Verbesserung der Beziehung zwischen beiden Ländern. Auch das amerikanische Programm "Parole" wird beendet. Damit hatten die Vereinigten Staaten kubanische Ärzte abgeworben. Die Regierung in Havanna hatte das Vorgehen stets als «Diebstahl kluger Köpfe» kritisiert.

«Während meiner Regierung haben wir dafür gearbeitet, das Leben der Kubaner in Kuba zu verbessern», sagte Obama. «Das ist der beste Weg, um sicherzustellen, dass die Kubaner Wohlstand erlangen, Reformen umsetzen und ihr Schicksal in die eigenen Hände nehmen. Die Zukunft Kubas sollte in den Händen der Kubaner liegen.»

Kubaner ahnten es

Viele Kubaner hatten zuletzt bereits gehnt, dass die Regelung im Zuge der Annäherung zwischen Washington und Havanna gekippt werden könnte. Tausende versuchten in den vergangenen Jahren, über Süd- und Mittelamerika in die USA zu gelangen. Vor einem Jahr hingen zahlreiche kubanische Migranten wochenlang in Costa Rica fest, weil Nicaragua ihnen die Durchreise verweigerte.

Ein weiteres Gesetz, nach dem Einwanderer aus Kuba bevorzugt behandelt werden, bleibt allerdings zunächst in Kraft. Der Cuban Adjustment Act aus dem Jahr 1966 bestimmt, dass Kubaner bereits nach einem Jahr und einem Tag in den USA ein unbefristetes Aufenthaltsrecht erhalten können.

<https://www.nzz.ch/international/entscheid-obamas-kein- asyl-mehr-fuer-bootsfluechtlinge-aus-kuba-ld.139591>

USA und Kuba

USA beendet Einreiseregulung für kubanische Bootsflüchtlinge

13.1.2017, 04:06 Uhr

US-Präsident Obama hat eine Regulung beendet, die es kubanischen Bootsflüchtlingen erlaubte in den USA Asyl zu beantragen. Die kubanische Regierung begrüßte die Entscheidung.

-
-
-
-
-
-

1 KOMMENTAR

(*afp/dpa/sda*) Der scheidende US-Präsident Barack Obama hat eine Regelung, durch die kubanische Bootsflüchtlinge Asyl in den USA beantragen konnten, ausser Kraft gesetzt. Obama teilte am Donnerstag mit, ab sofort würden kubanische Staatsangehörige, die illegal einreisten und nicht unter humanitären Schutz fielen, zurückgeschickt. «Damit behandeln wir Migranten aus Kuba genauso wie Migranten aus anderen Ländern», sagte Obama. Es sei ein Schritt, um die Beziehungen zu Kuba zu normalisieren.

Die kubanische Regierung begrüßte Obamas Entscheidung als «wichtigen Schritt». Havanna erklärte sich im Gegenzug bereit, alle von den USA ausgewiesenen Flüchtlinge zurückzunehmen, nicht nur im Meer aufgegriffene Bootsflüchtlinge.

Seit den 1960er Jahren hatten die USA alle kubanischen Flüchtlinge aufgenommen und ihnen den Weg zur US-Staatsbürgerschaft erleichtert. Weil dies zu einer Massenabwanderung aus Kuba führte und Kritiker die Regelung als Anreiz für die gefährliche Flucht per Boot ansahen, änderte der damalige US-Präsident Bill Clinton die Regelung.

«Wet foot, dry foot»

Nach der als «Wet foot, dry foot» bekannt gewordenen Politik durften Bootsflüchtlinge, die trockenen Füssen US-Territorium betreten, dort Asyl beantragen. Wurden die ohne Papiere einreisenden Migranten hingegen auf dem Wasser aufgegriffen, schicken die US-Behörden sie nach Kuba zurück. Die Regelung stammte aus dem Jahr 1995. Kuba hatte sie immer wieder kritisiert. Beide Länder hatten Ende 2014 völlig überraschend eine Wende in ihrem jahrzehntelang zerrütteten Verhältnis eingeleitet.

Acht Tage vor seinem Ausscheiden aus dem Amt zementierte Obama mit seiner Entscheidung den historischen Annäherungskurs an den kommunistischen Inselstaat. Sein Nachfolger im Weissen Haus, Donald Trump, steht der Annäherung an Kuba kritisch gegenüber.

<https://www.nzz.ch/international/usa-und-kuba-usa-beendet-einreiseregulung-fuer-kubanische-bootsfluechtlinge-ld.139577>

#

Neue US-Politik gegenüber kubanischen Migranten Schicksalsmoment auf der Brücke von Laredo

von Peter Gaupp, San José de Costa Rica 14.1.2017, 12:00 Uhr

Präsident Obama hat überraschend einen letzten Coup der Normalisierung mit Kuba gelandet. Immerhin leistet diesmal auch Havanna eine Konzession.

•

-
-
-
-
-

1 KOMMENTAR



Der amerikanische Präsident Barack Obama hat eine Woche vor dem Ende seiner Amtszeit die Praxis aufgehoben, die seit 1995 Kubanern, welche den Boden der Vereinigten Staaten betreten, Aufnahme und Starthilfe garantierte. (Bild: Charles Rex Arbogast / Keystone)

Als Marcos Roque und sein siebenjähriger Sohn am Donnerstagabend am Grenzübergang nach Laredo in Texas den Einreisestempel erhielten, wussten sie nicht, dass sie als letzte Kubaner ohne Visum aus Mexiko in die USA eingelassen wurden. Hinter ihnen strandeten Landsleute auf der Brücke über den Rio Grande, denen der Eintritt in die USA verweigert wurde. Meter und Minuten entschieden über Lebensschicksale.

Überraschender Zeitpunkt

Ohne Vorankündigung und mit sofortiger Wirkung hat der amerikanische Präsident Barack Obama eine Woche vor dem Ende seiner Amtszeit die Praxis aufgehoben, die seit 1995 Kubanern, welche den Boden der Vereinigten Staaten betreten, Aufnahme und Starthilfe garantierte. Bootsflüchtlinge, die die Küstenwache auf See aufbrachte, wurden demgegenüber zurückgeschafft. In Kraft bleibt freilich das Gesetz aus dem Jahr 1966, das legal in die USA eingereisten Kubanern nach einem Jahr die permanente Niederlassung garantiert; allein der Kongress kann es aufheben. Insofern bleiben Kubaner gegenüber andern Nationalitäten bevorteilt, doch benötigen sie jetzt zur legalen Einreise ebenfalls ein Visum oder müssen um politisches Asyl ersuchen.

Kuba – USA

Chronologie einer schwierigen Beziehungen

21.3.2016, 22:00

Eine der Hauptforderungen des Castro-Regimes zur weiteren Normalisierung der bilateralen Beziehungen ist damit erfüllt. Anders als bei den meisten wirtschaftlichen Lockerungen gibt es auch eine Gegenleistung. Havanna hat sich bereit erklärt, 2764 Kubaner zurückzunehmen, die während des Mariel-Exodus 1980 mit mehr als 120 000 andern das Land verliessen, aber von den USA nie akzeptiert wurden. Über weitere Deportationen soll von Fall zu Fall entschieden werden.

Ende des Ärzte-Braindrains

Ebenfalls aufgehoben hat Obama die 2006 von George W. Bush verfügte Praxis, Medizinpersonal aus Kuba bevorzugt Visa zu gewähren. Dies hatte zur Folge, dass Tausende aus Kuba in Drittländer entsandte Ärzte und Krankenpfleger die Gelegenheit zur Flucht in die USA nutzten, was das Castro-Regime nicht zu Unrecht als gezielten Braindrain anklagte. Dieser passte erst recht nicht mehr in die politische Landschaft, nachdem Washington und Havanna bei der Bekämpfung der Ebola-Epidemie in Afrika ab Herbst 2014 erfolgreich zusammengearbeitet hatten.

Das Weisse Haus rechtfertigte seine Beschlüsse damit, sie stellten Konsistenz in der Immigrationspolitik her. Auch unterstrich Obama, die Gestaltung der Zukunft Kubas sei Sache der Kubaner auf der Insel selbst, wie er schon bei seinem Besuch in Havanna im vergangenen März betont habe. Für Raúl Castro stellt der Politikwechsel, den er mit dem Argument der Gefahren der Migration übers Meer und durch Mittelamerika gefordert hatte, auch ein Problem für sein Regime dar, weil das Ventil der Auswanderung für Unzufriedene enger wird. Deswegen hatten, nur scheinbar paradox, auch Oppositionelle auf Kuba die Privilegien kritisiert.

Die Annäherung zwischen Washington und Havanna hatte in der Tat den Strom der Kubaner anschwellen lassen, die wegen fehlender beruflicher und wirtschaftlicher Perspektiven die Flucht in die USA antraten und Restriktionen zuvorkommen wollten. Die Zahl der Einreisen hat sich zwischen 2014 und 2016 auf mehr als 50 000 pro Jahr verdoppelt. Die Welle von Wirtschaftsmigranten hatte auch in kubanischen Exilkreisen Argwohn ausgelöst; so begrüßte der Vorsitzende der Cuban American National Foundation, Jorge Mas, Obamas Verfügung. Republikanische Politiker kubanischer Abstammung verurteilten sie indes als Konzession an Raúl Castro.

Und die Gestrandeten?

Unmittelbar Leidtragende der neuen Situation sind aber jene Kubaner, Tausende vermutlich, die sich vergeblich in die USA aufgemacht haben. Manche haben alles Hab und Gut verkauft, viel Geld an Menschenschmuggler bezahlt und sind auf der Reise beraubt und geschändet worden. Bei der Rückkehr nach Kuba stehen sie vor dem Nichts.

<https://www.nzz.ch/international/neue-us-politik-gegenueber-kubanischen-migranten-schicksalsmoment-auf-der-bruecke-von-laredo-ld.139793>

